

## Portreto de Dr. L.L. Zamenhof

Antaŭ 136 jaroj, precize la 15.12.1859, naskiĝis homo, kiu vivas kaj plu vivos en sia verko, kiun lia genio donacis al la homaro, kiu vivas en la abunda daŭre kreskanta tutmonda literaturo, en la gazetaro, revuoj, sur ondoj de radio, en kongresoj kaj konferencoj, eĉ en familioj de multaj kaj multaj miloj da personoj, alportante ĉiam iom da bonvolemo de la nobla homo. Jam pli ol mil urboj en la tuta mondo havas stratojn, placojn, parkojn, monumentojn, kiuj honoras la nomon de la aŭtoro de Esperanto, tamen la plej grandan kaj belan monumenton starigis al si Zamenhof mem per sia verko.

Zamenhof naskiĝis en medio modesta, humila, sed per sia verko li fariĝis personeco de la tutmonda formato.

Oni demandas: En kio konsistas la grandeco de Zamenhof?

La j. 1887 estas grava en la historio de la Internacia Lingvo. Tiujare, la 26.7., aperis la unua lernolibro de Esperanto sub pseŭdonomo d-ro Esperanto. La 40-paĝa libreto, rezulto de multjara laboro (entute 10-11 jaroj) konsistis el antaŭparolo, gramatiko, ekzercaro, vortaro, plue el kelkaj tekstoj kaj poemoj. La vortaro havis iom pli ol 900 radikojn, el kiuj per sistemo de prefiksoj kaj sufiksoj eblis derivi ĉ 10.000 vortojn, kio por la nova lingvo estis bonega. Komparu la nunajn 18.000 radikojn, el kiuj eblas fari pli ol 300.000 vortojn. Esperanto ekzistas 108 jarojn, sed dum tiu tempo ĝi akiris staton, por kiuj naciaj lingvoj bezonis jarcentojn.

Gravas, ke en ĉi tiu nova lingvo la aŭtoro verkis unuajn poemojn de delikata ritmo kaj harmonio, tial Esperanto estas dekomence ligita kun poezio. El ĉi tiu malgranda semo elkreskis dumtempe fortika arbo kun profundaj radikoj kaj larĝa branĉaro. Do malgraŭ ĉiuj obslakoj, antaŭjuĝoj, malpermesoj, persekutoj, malgraŭ krizoj kaj du mondmililoj Esperanto penetris en ĉiujn partojn de la mondo, en ĉiujn sociajn tavolojn, konstante evoluante kaj ĝi iĝis lingvo vivanta, jam tute natura, ne helpa, ne artefarita, sed lingvo internacia, instrumento de pensado kaj komunikado.

Post E. pluaj aliaj strebis, ĉu pro persona gloro aŭ pro nekomprenejo de la problemoj malkovri jam malkovritan Amerikon. Kelkaj projektoj devenis de rekonataj lingvistoj kaj kun aprobo de famaj nomoj, ili ankaŭ kaŭzis iom da konfuzo, sed ili restis nur projektoj kaj fiaskis. Al Esperanto dediĉis esperantisloj maksimuman zorgon, tiel ke ĝi taŭgas por kiu ajn fako de la kulturo. Esperanto venkis pli ol 900 projektojn kaj iĝis lingvo tute senkonkurenca; kiam oni traktas problemon de Internacia Lingvo, do nur Esperanto estas rekonata. Z. okupiĝis pri Internacia Lingvo de siaj plej junaj jaroj. Li sciis, ke lingvo estas socia fenomeno, ĝi devas kontentigi ĉiujn bezonojn de esprimado de ĉiu homgrupo. T.e. ĝi ne povas esti limigita nur al scienco aŭ al kiu ajn speciala fako, sed ĝi devas rilati al ĉiuj homaj aktivecoj. Zamenhof ĉion funde pripensis, la lingvon li elprovis per ekzaktaj tradukoj por liberigi ĝin de balastaj absurdaĵoj. La celo estis: plena lingvo, efektive internacia laŭ strukturo kaj maksimume facila. Tial ĝi havas fonetikan ortografion. Esperanto iĝis propraĵo de la internacia kolektivo, ĉu membro de tiu kolektivo sentas ĝin kiel sian propran lingvon.

La nova lernolibro, kiun Zamenhof dissendis al miloj da adresoj, kaŭzis grandan entuziasmon, aprobojn, laŭdojn. Sed ankaŭ ne ĉiuj estis kontentaj kun la tiama formo de la lingvo kaj proponis ŝanĝojn. Zamenhof zorge kaj tute demokrate atentis ĉiujn, kolektis ĉiujn proponojn, kaj komencis ilin publikigadi en revuo Esperantisto. Sed, li opiniis, se vi volas havi reformojn, havu ilin, kaj la liston de proponoj draste kompletigis per la propraj proponoj. Tion esperantistoj ektimis, rifuzis per 2 balotadoj ĉiujn ŝanĝojn kaj deziris, ke Esperanto restu en sia origina formo. Tiel finiĝis la sterila tempo de lingvaj bataloj kaj la literaturo komencis kreski. Esperanto ricevis dote d-ro Zamenhof kiel lingviston, filozofon, scienciston, verkiston, poeton, humaniston. Sed por Zamenhof la Internacia Lingvo ne estis celo por si mem, sed unu el rimedoj por forigi miskomprenojn, malamon, ĵaluzon, diskriminaciojn. Zamenhof vivis en medio plurlingva, saturita de reciprokaj intergentaj antagonismoj, per Lingvo Internacia li volis atingi reciprokajn konfidon, respekton, demokration inter lingvo, forigi lingvajn kaj kulturajn subpremadojn.

Zamenhof multe tradukis. La tradukoj prezentas en lia verkaro la plej ampleksan parton, la plej gravan. Lia unua traduko estis La Batalo de I' vivo de Dickens, sed vere ŝtorman akcepton

senkomparan admiron atingis Hamleto de Shakespeare. Sekvis La Revizoro de Gogol, La Rabistoj de Schiller, Ifigenio en Taŭrido de Goethe, Rabeno de Baharah de Heine, Marta de Orzesko, La Malnova Testamento, La Proverbaro, Fabeloj de Andersen... Kongresaj paroladoj, Vortoj de Zamenhof.

La tradukoj helpis al ellaboro de la lingvo, stilo, provizis ĝin per vortkonstruoj, proverboj, metaforoj. Zamenhof mem estis modesta, pacama, pedante ordema, timema antaŭ la publiko, kontraŭ oficialaj ceremonioj, klopodanta ĉiam mildigi konfliktojn, denaske ĝentila kaj alte sentema por justeco. Komence mi diris, ke Zamenhof verkis poemojn admiratajn, laŭdegatajn. Sed lia plej granda poemo estas Esperanto mem. Zamenhof enspiris en la lingvon koron kaj animon, spiriton de humanismo, kiu fortigis la solidarecon inter esperantistoj, kontribuis al reciproka respektado kaj tiel ligis ĝin kaj ilin kun la grandaj idealoj de la homaro.

Zamenhof konfidis, donacis la lingvon al la tuta mondo. Tial super Esperanto laboris kaj plu ĝin konstruis poetoj kaj sennombraj uzantoj de la tuta mondo. Zamenhof dediĉis al la nuna lingvo maksimuman penadon, tial Esperanto estas rezulto de komuna laboro de la tuta mondo.

Privat skribis pri Zamenhof: li vivis bonkore, pure, modeste, helpeme, mirinde pacienca, ĉiam simpatie aŭskultis aliajn homojn, eĉ tedajn. Ĝis la morto li vivis tre modeste, tre malriĉe. Granda li estis publike, granda private. Lia verko restis, ne peros, daŭre flore ĝi vivos.

-jv -

*Kluba Bulteno EK Brno 1/1996, p. 3-4*

(Lasta verko de Josef Vondroušek) Antaŭ 136 jaroj, precize la 15.12.1859, naskiĝis homo, kiu vivas kaj plu vivos en sia verko, kiun lia genio donacis al la homaro, kiu vivas en la abunda daŭre kreskanta tutmonda literaturo, en la gazetaro, revuoj, sur ondoj de radio, en kongresoj kaj konferencoj, eĉ en familioj de multaj kaj multaj miloj da personoj, alportante ĉiam iom da bonvolemo de la nobla homo. Jam pli ol mil urboj en la tuta mondo havas stratojn, placojn, parkojn, monumentojn, kiuj honoras la nomon de la aŭtoro de Esperanto, tamen la plej grandan kaj belan monumenton starigis al si Zamenhof mem per sia verko.

Zamenhof naskiĝis en medio modesta, humila, sed per sia verko li fariĝis personeco de la tutmonda formato.

Oni demandas: En kio konsistas la grandeco de Zamenhof?

La j. 1887 estas grava en la historio de la Internacia Lingvo. Tiujare, la 26.7., aperis la unua lernolibro de Esperanto sub pseŭdonomo d-ro Esperanto. La 40-paĝa libreto, rezulto de multjara laboro (entute 10-11 jaroj) konsistis el antaŭparolo, gramatiko, ekzercaro, vortaro, plue el kelkaj tekstoj kaj poemoj. La vortaro havis iom pli ol 900 radikojn, el kiuj per sistemo de prefiksoj kaj sufiksoj eblis derivi ĉ 10.000 vortojn, kio por la nova lingvo estis bonega. Komparu la nunajn 18.000 radikojn, el kiuj eblas fari pli ol 300.000 vortojn. Esperanto ekzistas 108 jarojn, sed dum tiu tempo ĝi akiris staton, por kiuj naciaj lingvoj bezonis jarcentojn.

Gravas, ke en ĉi tiu nova lingvo la aŭtoro verkis unuajn poemojn de delikata ritmo kaj harmonio, tial Esperanto estas dekomence ligita kun poezio. El ĉi tiu malgranda semo elkreskis dumtempe fortika arbo kun profundaj radikoj kaj larĝa branĉaro. Do malgraŭ ĉiuj obslakloj, antaŭjuĝoj, malpermesoj, persekutoj, malgraŭ krizoj kaj du mondmililoj Esperanto penetris en ĉiujn partojn de la mondo, en ĉiujn sociajn tavolojn, konstante evoluante kaj ĝi iĝis lingvo vivanta, jam tute natura, ne helpa, ne artefarita, sed lingvo internacia, instrumento de pensado kaj komunikado.

Post E. pluaj aliaj strebis, ĉu pro persona gloramo aŭ pro nekomprenemo de la problemo malkovri jam malkovritan Amerikon. Kelkaj projektoj devenis de rekonataj lingvistoj kaj kun aprobo de famaj nomoj, ili ankaŭ kaŭzis iom da konfuzo, sed ili restis nur projektoj kaj fiaskis. Al Esperanto dediĉis esperantisloj maksimuman zorgon, tiel ke ĝi taŭgas por kiu ajn fako de la kulturo. Esperanto venkis pli ol 900 projektojn kaj iĝis lingvo tute senkonkurenca; kiam oni traktas problemon de Internacia Lingvo, do nur Esperanto estas rekonata. Z. okupiĝis pri Internacia Lingvo de siaj plej junaj jaroj. Li sciis, ke lingvo estas socia fenomeno, ĝi devas kontentigi ĉiujn bezonojn

de esprimado de ĉiu homgrupo. T.e. ĝi ne povas esti limigita nur al scienco aŭ al kiu ajn speciala fako, sed ĝi devas rilati al ĉiuj homaj aktivecoj. Zamenhof ĉion funde pripensis, la lingvon li elprovis per ekzaktaj tradukoj por liberigi ĝin de balastaj absurdaĵoj. La celo estis: plena lingvo, efektive internacia laŭ strukturo kaj maksimume facila. Tial ĝi havas fonetikan ortografion. Esperanto iĝis propraĵo de la internacia kolektivo, ĉu membro de tiu kolektivo sentas ĝin kiel sian propran lingvon.

La nova lernolibro, kiun Zamenhof dissendis al miloj da adresoj, kaŭzis grandan entuziasmon, aprobojn, laŭdojn. Sed ankaŭ ne ĉiuj estis kontentaj kun la tiama formo de la lingvo kaj proponis ŝanĝojn. Zamenhof zorge kaj tute demokrate atentis ĉiujn, kolektis ĉiujn proponojn, kaj komencis ilin publikigadi en revuo Esperantisto. Sed, li opiniis, se vi volas havi reformojn, havu ilin, kaj la liston de proponoj draste kompletigis per la propraj proponoj. Tion esperantistoj ektimis, rifuzis per 2 balotadoj ĉiujn ŝanĝojn kaj deziris, ke Esperanto restu en sia origina formo. Tiel finiĝis la sterila tempo de lingvaj bataloj kaj la literaturo komencis kreski. Esperanto ricevis dote d-ron Zamenhof kiel lingviston, filozofon, scienciston, verkiston, poeton, humaniston. Sed por Zamenhof la Internacia Lingvo ne estis celo por si mem, sed unu el rimedoj por forigi miskomprenojn, malamon, ĵaluzon, diskriminaciojn. Zamenhof vivis en medio plurlingva, saturita de reciprokaj intergentaj antagonismoj, per Lingvo Internacia li volis atingi reciprokajn konfidon, respekton, demokration inter lingvo, forigi lingvajn kaj kulturajn subpremadojn.

Zamenhof multe tradukis. La tradukoj prezentas en lia verkaro la plej ampleksan parton, la plej gravan. Lia unua traduko estis La Batalo de I' vivo de Dickens, sed vere ŝtorman akcepton senkomparan admiron atingis Hamleto de Shakespeare. Sekvis La Revizoro de Gogol, La Rabistoj de Schiller, Ifigenio en Taŭrido de Goethe, Rabeno de Baharah de Heine, Marta de Orzesko, La Malnova Testamento, La Proverbaro, Fabeloj de Andersen... Kongresaj paroladoj, Vortoj de Zamenhof.

La tradukoj helpis al ellaboro de la lingvo, stilo, provizis ĝin per vortkonstruoj, proverboj, metaforoj. Zamenhof mem estis modesta, pacama, pedante ordema, timema antaŭ la publiko, kontraŭ oficialaj ceremonioj, klopodanta ĉiam mildigi konfliktojn, denaske ĝentila kaj alte sentema por justeco. Komence mi diris, ke Zamenhof verkis poemojn admiratajn, laŭdegatajn. Sed lia plej granda poemo estas Esperanto mem. Zamenhof enspiris en la lingvon koron kaj animon, spiriton de humanismo, kiu fortigis la solidarecon inter esperantistoj, kontribuis al reciproka respektado kaj tiel ligis ĝin kaj ilin kun la grandaj idealoj de la homaro.

Zamenhof konfidis, donacis la lingvon al la tuta mondo. Tial super Esperanto laboris kaj plu ĝin konstruis poetoj kaj sennombraj uzantoj de la tuta mondo. Zamenhof dediĉis al la nuna lingvo maksimuman penadon, tial Esperanto estas rezulto de komuna laboro de la tuta mondo.

Privat skribis pri Zamenhof: li vivis bonkore, pure, modeste, helpeme, mirinde pacienca, ĉiam simpatie aŭskultis aliajn homojn, eĉ tedajn. Ĝis la morto li vivis tre modeste, tre malriĉe. Granda li estis publike, granda private. Lia verko restis, ne peros, daŭre flore ĝi vivos.

-jv -

*Prezentita en la klubo 13.12.1995.*

*Bulteno de EK Prago kaj Brno, 1/1996, p. 3-4.*

*(Lasta verko de Josef Vondroušek)*